

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1076 (76/2020)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Unuiĝintaj Nacioj fariĝis 75-jaraj.....	2
- Usate "Informilo!"	5
- Proponoj por la hibrida IKU en Belfasto	5
- Corso "casereccio" di Esperanto	5
- Internacia Fervojisto	6
- Filatelio ed esperanto	6
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton.....	7
- Pillole di Salvezza 1076: Wikipedia.....	7

UNUIĜINTAJ NACIOJ FARIĜIS 75-JARAJ

Mi aperigas ĉi-sube la kompletan raporton de Humphrey Tonkin, reprezentanto de UEA ĉe UNO, por informo kaj opiniinterŝanĝo. Jes, longas, sed vere plenplenas pri interesaj temoj. Ĝuu ĝin!

La Jaro 2020

Neformala raporto de Humphrey Tonkin, reprezentanto de UEA apud Unuiĝintaj Nacioj, Novjorko

1. Ĝenerale

La pasinta jaro estis escepte malfacila. Jam frue en la pandemio oni decidis, ke la granda plimulto de la oficistoj de UN laboru ĉeĥejme kaj oni fermis la sekretariatan domon. Sekve, la neformalaj kontaktoj inter oficistoj unuflanke kaj reprezentantoj de neregistaraj organizoj (NROj) aliflanke (tiel esencaj elementoj de niaj rilatoj) ne povis okazi. Same ankaŭ koncerne la rilatojn inter NROj kaj naciaj misioj. La normalaj kunsidoj de la NRO-komitatoj ĉesis okazi. Kelkaj NRO-komitatoj daŭrigis almenaŭ iom da kunsidado virtuale, sed la komitato en kiu UEA ĉefe aktivas, nome tiu pri edukado, ne okazigis eĉ virtualajn kunsidojn. Do, en tiu sektoro ĉio haltis. Kvankam UEA havas oficejon tuj apud la UN-domo, dum la pasintaj monatoj ĝi estis praktike nealirebla.

2. CoNGO

Rilatoj kun la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en konsultaj rilatoj kun EKOSOK (la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN – la ĉefa ligo inter UN kaj NROj) estis same interrompitaj, sed la estraro de CoNGO (UEA estas estrarano de tiu grava organizo, rezulte de baloro antaŭ du da jaroj) almenaŭ sukcesis renkontiĝi virtuale. Mi restas en proksima kontakto kun la prezidanto de CoNGO (tamen ne tiel proksima kiel antaŭe: niaj oficejoj estas en la sama konstruaĵo, sed ankaŭ ĉe CoNGO oni laboras deĥejme). Malpli sukcesa estis interkonsento kun CoNGO pri kuna dungo de staĝanto por helpi ambaŭ organizojn, ĉar la fermiĝo de la UN-domo esence faris lian laboron neplenumbla. UEA kaj TEJO ankaŭ faris interkonsenton pri helpo de dungito de TEJO, Spyros Papadatos, en la UN-laboro, sed tio montriĝis ankaŭ malfacile plenumbla, malgraŭ niaj klopodoj. Unu el la pozitivaj efikoj de la kunlaboro kun CoNGO estas tio, ke CoNGO komencis aperigi ĉe sia retejo ĉefajn dokumentojn en Esperanto-traduko. La Novjara Mesaĝo de la prezidanto de CoNGO baldaŭ aperos ĉe ties retejo (<http://ngocongo.org/>), ankaŭ en Esperanto.

3. MondaFest'

La temo de la neokazinta Universala Kongreso 2020 ("UN 75-jara") estis transmetita al la Monda Festivalo de Esperanto, kie ni havis la grandan lukson de tempo: ni povis organizi plurajn aranĝojn – diskutojn, prelegojn, podiajn prezentojn k.s. – tra du-tri monatoj. Dank' al la laboro de la organiza komisiono de la festivala temo, kaj precipe al Rakoen Maertens, ni malnetigis detalan

raporton, kiun mi nun finredaktas, kaj kiu estos prezentita al UN. UN sendis specialan videosaluton al la Festivalo, farita de Fabrizio Hochschild-Drummond, kunordiganto de la programo por la 75-jariĝo de UN: https://www.youtube.com/watch?v=kFufDNdgrXo&ab_channel=UnitedNations-Esperanto-Unui%C4%9DintajNacioj. Kiam la kongreso en Montrealo estis ankoraŭ planata, UEA invitis s-ron Hochschild ĉeesti la kongreson – kaj li akceptis. Bedaŭrinde, ke tiu vizito ne povis okazi. Esperanto estis inter la lingvoj uzataj en enketo lanĉita de UN okaze de la 75-jariĝo de UN. Jon Liechty aktive helpis en administrado kaj funkciigo de la enketo.

4. Gvidilo pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo

Unu el la flankaj produktoj de MondaFest' estis gvidilo al la 17 Celoj. La gvidilo, sub redakto de Rakoen Maertens kaj mi, enhavas 17 ĉapitrojn pri la 17 Celoj, de entute 17 esperantistaj fakuloj. Ĝi estas trovebla en la retejo esperantoporun.org kaj estas ankaŭ havebla libroforme ĉe la eldonejo Mondial. Ni esperas, ke, iom post iom, la diversaj landaj asocioj kaj aliaj E-asocioj utiligos la gvidilon kaj donos pli da atento al la Celoj. Se ni faros tion, ni ne nur faros utilan laboron, sed ni ankaŭ povos tion raporti al UN kaj tiel montri, ke ni faras nian eblon por antaŭenigi la Celojn. Nia kunlaboranto Anna Bennett lanĉis diskutan grupon en Esperanto pri la 17 Celoj.

5. Specialaj tagoj

UN havas tutan kalendaron da specialaj tagoj (UN nomas ilin "specialaj observoj") pri plej diversaj temoj. Ni kreis liston de dudeko de tiuj ĉiujaraj tagoj (ekzemple, UN-Tago, Homrajta Tago, Internacia Edukada Tago, Tago de Ne-Perforto k.s.). Ni klopodas observi ilin per iu speciala deklaro aŭ komunikado kaj ni klopodas konvinki la Esperanto-movadon atenti ilin kaj la laboron kiun ili reprezentas. Niaj tiurilataj elpaŝoj ĝis nun havis nur limigitan efikon – kvankam ili ja donas al ni bonan okazon kontakti UN kaj ankaŭ informi aliajn NROjn. Ni do lanĉis du novajn iniciatojn: (1) Ni klopodos jam kelkajn semajnojn antaŭe pretigi niajn deklarojn kaj cirkuligi ilin en la E-movado, do ne fari ĉion lastmomente, kaj (2) Ni pretigos gvidilon (iom similan al tiu pri la 17 Celoj) pri la diversaj tagoj kiujn ni aparte markas. Anna Bennett konsentis kunordigi ĉi-lastan laboron.

6. Informilo

Per la januara-februara numero de nia dumonata informilo, ni atingos la kvindekan numeron sub mia redakto. Ni daŭrigos la aperigon, sed serĉas manierojn pli rekte ligi la informilon ankaŭ al retaj medioj. Ni ŝatus ankaŭ penetrigi la materialon en la nacilingvan informadon en la diversaj landoj.

7. NRO-Komitato pri Lingvo kaj Lingvoj

Konstanta plendo de UEA kaj fakuloj pri lingva politiko estas la manko de atento al la lingva dimensio de la laboro de UN. La ses oficialaj lingvoj de UN ne estas egale pritraktataj. La du lingvoj de la Sekretariato, la angla kaj la franca, ankaŭ ne estas egalaj. La utiligo de aliaj lingvoj en la laboro de UN, ekzemple por atingi pli vastan publikon, ricevas malpli da atento ol oni atendus en organizo unu el

kies celoj estas mobilizi la ordinarajn homojn por kunhelpi en la agado. Ekzistas antaŭjuĝoj rilate la relativan prestiĝon de la diversaj lingvoj.

Por finfine malfermi tiujn ĉi demandojn al publika diskutado, UEA proponis starigon de Komitato de NROj pri Lingvo kaj Lingvoj (do pri lingvouzo kaj pri lingvoelekto). Ekzistas jam trideko da tiaj tielnomataj NRO-Komitatoj sub aŭspicio de CoNGO en Novjorko, kaj iom pli ol dudeko en Ĝenevo kaj Vieno. Por starigi tian komitaton, oni bezonas dudekon da fondaj NROj kiuj estas samtempe membroj de CoNGO. Ĝis nun ni varbis 14. Ni nun serĉas la aliajn 6. Ili devas esti organizoj ne nur membroj de CoNGO sed ankaŭ en konsultaj rilatoj kun Ekosok. Se niaj klopodoj sukcesos, temos pri signifa antaŭenpaŝo. Estas multe pli facile konvinki misiojn ĉe UN aŭ funkciulojn de UN aperi ĉe tiuj komitatoj ol klopodi fari tion ekster la formalaj strukturoj. Kaj tio faciligos levadon de lingvaj demandoj en la sino de UN.

8. Simpozio

La Studo-Grupo pri lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj, kiujn ni lanĉis antaŭ pluraj jaroj kaj en kiu kunlaboras fakuloj pri lingvoj, UN-oficistoj, diplomatoj, kaj reprezentantoj de NROj, organizas ĉiujare en Novjorko simpozion. Pro la pandemio, ni estis devigataj prokrasti tiun por 2020. Nia temo estis "Lingvo kaj Migrado". La simpozio de 2020 fakte estis kunlabora aranĝo kun la koncerna esplorcentro de la Universitato Princeton. Ni nun decidis okazigi la simpozion virtuale en la jaro 2021, sub samaj aŭspicioj, tra entute kvin tagoj inter 19 aprilo kaj 1 majo. Laŭ la nun antaŭvidata plano, ni prezentos referaĵojn kaj okazigos diskutojn dum tri horoj en ĉiu el tiuj kvin tagoj (19, 21, 23, 28 aprilo, kaj 1 majo). La sesioj (en la angla lingvo) komenciĝos je la 10-a horo (15-a horo UTC) kaj finiĝos je la 13-a horo (18-a horo UTC), do je horoj konvenaj almenaŭ por la amerikaj kontinentoj kaj Eŭropo. Detalojn de la programo ni anoncos baldaŭ. Aliĝo estos necesa, sed senpaga. Kutime en la ĉiujara simpozio partoprenos kiel parolantoj ankaŭ oficistoj de UN kaj reprezentantoj de misioj kaj NROj. Ĉi-foje, la partopreno de UN estos tre limigita pro la pandemio. Kunaŭspicias la Simpozion ankaŭ CED, ESF, la Centro pri Aplika Lingvistiko (Vaŝintono), kaj Birkbeck, Universitato de Londono.

9. Organiza strukturo

Jam de kelkaj jaroj **Sara Spanò**, iama estrarano de UEA, helpas prizorgi la formalizaĵojn de niaj rilatoj kun UN, raportante pri niaj oficialaj reprezentantoj, akirante oficialajn UN-permesilojn, ktp. Mi ĝojas informi, ke ŝi konsentis, kaj la estraro de UEA aprobis, iom pli vastan rolon por ŝi ekde 2021. Ni multe dankas al Sara pro tiu preteco. Ŝi kunordigos la UN-laboron en la diversaj centroj (Novjorko, Vieno, Ĝenevo, certagrade Parizo), tiel permesante al mi iom pli forte koncentri mian energion en Novjorko. **Jon Liechty** jam helpas nin en la UN-agado, kaj nun konsentis (dankon, Jon) daŭrigi en la jaro 2021. **Scott Turton** lastatempe informis nin, ke li ne plu povos daŭrigi sian laboron kiel prizorganto de la retejo esperantoporun.org. Ni nun serĉas novan prizorganton. Scott prizorgos la retejon ĝis la fino de marto. Se ĝis tiam ni ne trovos novan prizorganton, **Chuck Mays** prizorgos ĝin intertempe. **Ulrich Becker** kaj **Sofiya Soskina** daŭre prizorgas dissendon de la informilo. **François Lo Jacomo**, aldone al sia laboro ĉe Unesko, tradukas ĝin en la francan.

Resume, do, la jaro 2020 montriĝis pli sukcesa ol ni antaŭsupozis, sed malpli sukcesa ol ni esperis. La fidela subteno de nia UN-laborgrupo estis granda kontribua faktoro en niaj atingoj. Dankon!

HT

10 januaro 2021

USATE "INFORMILO"!

 Informilo



Gruppi, soci, simpatizzanti: avete organizzato, state organizzando, avete svolto un'attività? Volete farla conoscere? Usate "Informilo" (ttt.esperanto.it/informilo) per farlo sapere a tutti: i redattori delle nostre riviste consultano "Informilo" per sapere che succede in giro, e poi diffonderlo.

CORSO "CASERECCIO" DI ESPERANTO

Il Gruppo Esperantista Tuscolano organizza, per febbraio 2021, un corso per komencintoj su Zoom, dedicato a chi vuole cominciare a parlare la lingua. Contattare Renato Corsetti (renato.corsetti@gmail.com).

PROPONOJ POR LA HIBRIDA IKU EN BELFASTO BONVENAJ ĜIS 31.1.2021

La periodo por sendi proponojn por la Internacia Kongresa Universitato en Belfasto estis plilongigita. Resumon kaj biografieton bv. sendi al la IKU-

sekretario (amri@huji.ac.il) ĝis la 31-an de januaro 2021. Honorario: 260 EUR, duono dependas de ĝustatempa livero de teksto por la IKU-libro kaj duono – de fizikaj partopreno en la UK kaj okazigo de la prelego. Ĉar la kongreso estas planata kiel hibrida, fizika partopreno ne estas nepra kondiĉo. Ekzemplon de resumo eblas vidi en <https://uea.org/teko/IKU>.

Internacia Fervojisto

Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)
revuo pri fervojo



Aperis la nova numero de la revuo de la esperantistaj fervojistoj, plena je interesaj novaĵoj. Interesatoj sin turnu al la sekretario de IFEA, Vito Tornillo (sekretario@ifef.net).

FILATELIA ED ESPERANTO

Dal 19 gennaio inizia la collaborazione tra ELF/AREK, la lega degli esperantisti filatelici, e la rivista di settore *Il Postalista*, con articoli e presentazioni sull'esperanto e sulla lunga storia che lega la lingua e il collezionismo, con cadenza mensile.

VAI ALL'INDICE GENERALE CERCA NEL SITO con DuckDuckGo VAI SCRIVI AL POSTALISTA

il Postalista

Martedì 19 gennaio, avrà inizio la nuova rubrica **Esperanto en la Filatelo**, in collaborazione con Esperanto-Ligo Filatelista (ELF/AREK)

il primo articolo: **Esperanto? Kio ĝi estas?** Non disperate, gli articoli sono anche tradotti in italiano: **Esperanto? Che cos'è?** così come la pagina degli articoli: **L'Esperanto nella Filatelia**. Questo darà modo, per chi non conosce l'esperanto, ma si dimostra curioso, di apprezzare e magari iniziare a studiare questa lingua internazionale.

CHIUDI FINESTRA

IL MUSICALISTA
Mykola Arkas, la pers
poliedrica di uno dei più
moderna cultura dell'U
Pietro PALLINI

Marino BIGNAMI

Flash n. 87

LA COLLEZIONE NASCE DAL BISOGNO DI
TRASFORMARE LA CORRISPONDENZA

AL 22 APRILE 2001
LA FILATELIA

EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON

Il vostro redattore vi vuole bene, e pensa al vostro mal di testa: la trascrizione "fonetica" di "Pasta Aspajty Blonez" è "Pasta a spaĵti Bolonez", cioè... "Spaghetti alla Bolognese", che, dannazione, NON ESISTONO! Col ragù a Bologna si mangiano le TAGLIATELLE!



PILLOLE DI SALVEZZA 1076: WIKIPEDIA

Il 15 gennaio 2001 gli statunitensi Jimmy Wales e Larry Sanger lanciarono l'enciclopedia in rete "Wikipedia", it.wikipedia.org/wiki/Wikipedia, il cui nome deriva dalla fusione della parola havaiana "wiki" (velocemente) e di quella inglese "encyclop(a)edia" ("enciclopedia").

All'inizio in lingua inglese, oggi è in quasi 300 lingue, compreso l'Esperanto. È la più consultata fonte di informazioni in rete, anche se, per la sua gestione libera, viene a volte criticata quanto ad affidabilità.

Alleghiamo un francobollo italiano del 1998, su bozzetto di Anna Maria Maresca, per la comunicazione in rete.

